

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

112-a jaro • n-ro 1333 (3) | marto 2019

El la historio de la Esperanta gazetaro

Juna sciencisto esploras pri
Esperanto en la Rusia Imperio | 62

La Reta Revuo

Kio estas ĝi? La nova projekto
de UEA. Kiel kontribui? | 51



Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitriĝ Ševĉenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek

Kovrilpaĝaj fotoj: la 1-a Universala Kongreso;
la 102-a Universala Kongreso

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
faks.: +31 10 436 1751
<http://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Volegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifoj (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.
Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimume €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en
Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

tel.: +31-10-436-1044 faks.: +31-10-436-1751
uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



51

La Reta Revuo


Kio estas la Reta Revuo? Kiel kontribui?
Kio pri la recenzoj? La respondojn al tiuj
kaj aliaj demandoj legu en la artikolo de
la redaktoroj.



58

50 jaroj de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

La 2-an de marto 1969 fondiĝis la plej
tradicia, ankoraŭ ege agema rondo de
fakuloj ene de Universala Medicina
Esperanto-Asocio (UMEA), nome la
Budapeŝta Medicina Esperanto-Fak-
grupo (BMEF).



60

Instituto Zamenhof en Lomeo, Togolando, juvelo inter la ZEO-j

Mireille Grosjean vizitis la Instituton
Zamenhof (IZ) kaj intervjuis Gbeglo
Koffi. Laŭ ŝia opinio se iu restadas en
Lomeo, tiaspeca vizito nepras.



62

El la historio de la Esperanta gazetaro

Juna sciencisto, Nikolay V. Kuznetsov,
esploras pri Esperanto en la Rusia
Imperio kaj la unuaj jaroj kontraŭstare
al cenzuro, esplorante la dosierojn el la
Rusia Ŝtata Historia Arĥivo.

Kalejdoskope | 53

Vaste kaj plurcele paroli
pri Kulturo | 54

Universala Kongreso
Kiel kondukti en finna
saŭno | 55

Historio | 56
Cent jarojn post la fino de
Neŭtrala Moresneto

Libroservo | 57
Momenta kresko en la
libroservaj vendoj

Rete | Opinio | 64
Lernu!, Edukado.net,
Duolingo... kaj nun?

Landa agado | 65
Modernigi Esperantajn
klubojn: la Pernambuka
ekzemplo

Recenzo | 66
Verko, kiu plenigas
vakuojn

Landa agado | 67
Du gravaj eventoj okazis
en Liaoning, Ĉinio

Oficiala Informilo | 68

Recenzo | 69
Puto de serpentoj

Venontaj renkontiĝoj | 70
Forpaso | 71

Estraro de Universala
Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Mark Fettes,
2658 E 21st Av, Vancouver BC, Kanado.
VSM 2W1; +1-778-928-4489
mtfettes@sfu.ca

Vicprezidanto: S-ro Stefan MacGill,
Berlino u. 43
Budapest, HU-1045, Hungario.
stefan.macgill@gmail.com. Nur mesaĝoj
al tiu adreso ricevas atenton

Ĝenerala Sekretario: Aleks Kadar
197 rue de Lourmel
FR-75015 Paris, Francio
Poŝtel: +33 6 86 58 00 20
Retpoŝto: alekska@gmail.com

Membro: D-ino Sara Spano,
Philosophenweg 28, 28195
Bremen, Germanio
mariaosaria.spano@gmail.com

Membro: S-ro Emilio Cid,
R. Julio Prestes 904, 11390-150 São

Vicente - SP, Brazilo +5513-99778-
7367 cid.emilio@gmail.com

Membro: S-ro LEE Jungkee,
401 dong 301 ho Dongpyun-ro 135,
Dongan-ku, 431-907, Anyang-si,
Kyungki-do, Korea Resp. +82 10 3340
5936 leejungkee@khu.ac.kr

Membro: S-ro Trezoro Huang Yinbao
Esperanto-Centro Ora Ponto
Jingchuan-Xian, Jinqiao Guoji, 744300
Pingliang, Ĉinio
trezoro@qq.com, +86-18893316800

Membro: Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr.
fmaiajr@gmail.com

Observantoj de TEJO: D-ro Francesco
Maurelli, S-ino Hoan Tran

Observanto de ILEI:
S-ino Mirejo Grosjean

La estraranoj respondecas pri la jenaj
difinitaj aspektoj de la asocia politiko:

D-ro Mark Fettes: Strategio, Kunordigo, Statuta
Reformo, Esploro kaj Dokumentado

Stefan MacGill: Instruado, Meza Oriento kaj Norda
Afriko, Rilatoj kun Membro-Organizoj kaj revuo
Esperanto

Aleks Kadar: Eŭropa Agado

D-ino Sara Spano: Eksteraj Rilatoj, Aktivula Maturigo,
Gemelaj Urboj, Terminologio

Trezoro Huang Yinbao: Financoj, Unesko-Kuriero

Emilio Cid: Informado, Amikoj de Esperanto, Forumo

LEE Jungkee: Azio, Faka kaj Scienca Agado kaj
Esperanto-Centroj

Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr.: Afriko, Kulturo
kaj Kongresoj

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>

La Reta Revuo

■ Dima Ŝevĉenko,
Anna Striganova

Kio estas la Reta Revuo?

En 2017 estis lanĉita retejo de la revuo *Esperanto*. Pri tio vi povas trovi kelkajn raportojn sur la paĝoj de la antaŭaj numeroj. En novembro 2018 la redakcio kune kun la Estraro de UEA komencis evoluigi novan projekton – *Reta Revuo* (<https://revuoesperanto.org>). Laŭkoncepte ĝi estas multe pli ol simpla retejo de la revuo *Esperanto*, kie aperas informoj pri la periodaĵo, kelkaj artikoloj kaj elŝuteblaj numeroj por varbi abonantojn ktp. Temas pri la projekto de plenvalora reta amaskomunikilo, kiun UEA ĝis nun ankoraŭ ne havis, kiu iĝis paralela, sed ne egala al la tradicia revuo, aperanta papere kaj PDF-forme.

UEA situas en la centro de la Esperanto-movado. La tradiciaj revuoj, paĝoj en la sociaj retoj kaj kelkaj elektronikpoŝtaj dissendolistoj estas gravaj informfluo inter la membraro, la ekstera publiko kaj la Asocio. La nova *Reta Revuo* celas iĝi ankoraŭ unu strategia komunikilo de UEA, kiu direktas sian rigardon al la estonteco kaj paŝas kune kun la teknika kaj informada progreso.

En la *Reta Revuo* estas publikigataj kelkaj artikoloj, antaŭe aperintaj en la paperforma versio; ĉefe tio rilatas al la recenzoj, informoj pri la gravaj eventoj, deklaroj ka. Tamen ili estas nur

eta parto de tio, kion povas legi la abonantoj de la tradicia revuo kaj krome tiuj materialoj aperas multe pli poste – ofte monatojn aŭ eĉ jarojn post la publikigo papere.

Sed la *Reta Revuo* ne limiĝas per tiaspecaj publikaĵoj kaj ili ne estas la ĉefa enhavo de la retejo. Nuntempe okazas aktiva laboro por evoluigi specialajn rubrikojn, kiel *Monda Kulturo* kaj *Beletra rubriko* kaj kelkajn aliajn. Pri la unua legu pliajn detalojn ĉi-numere en la artikolo de la estrarano de UEA Fernando Maia Jr. Pri la dua legu sube en la klarigoj pri la kontribuoj.

Unu el la celoj de la *Reta Revuo* estas ankaŭ iĝi centro por interŝanĝi opiniojn pri la Esperanto-movado. UEA estas kontraŭ cenzuro kaj poras esprimon de ĉies opinioj; tamen ili ne estu kontraŭ la principoj de UEA, UN

kaj Unesko, la sociaj normoj kaj internaciaj leĝoj.

Ofte okazas tiel, ke materialoj vere kvalitaj kaj gravaj por la Esperantomondo ne taŭgas por la tradicia versio de la revuo. Foje pro la grandeco (ĉar la papera revuo havas tre limigitan spacon), foje pro la formo aŭ ĝenro. Ekzemple, la papera revuo ne povas akcepti beletraĵojn, sed la *Reta Revuo* estas tute taŭga loko por ili. Aŭ se temas pri interesaj longaj raportoj pri gravaj lokaj Esperanto-renkontiĝoj, aŭ pri gravaj artikoloj, kiuj ne rekte rilatas la Esperanto-movadon, gramatikaj diskutoj pri la lingvo, kaj multo alia. Krome grava aspekto estas, ke en la 21-a jarcento homoj ofte kutimas konsumi la enhavon plurmedie, sed ne nur legi. Gravan rolon en tiu ĉi evoluo ludas la projekto, gvidata de la estrarano

The screenshot shows the website for 'La Reta Revuo'. At the top is the 'Esperanto' logo with the tagline 'Legata en 120 landoj'. A navigation bar includes links for 'La revuo', 'Abonu', 'Libere elŝutu', 'Legu', and 'Kontribuu'. The main content area features a 'Kulturo' section with an article titled 'Konstruisto por elstarigi ponton de internaciaj kulturaj interŝanĝoj' by Wu Guojiang. Below the article is a photo of Song Yunsheng and a brief bio. To the right, there's a sidebar with a search bar and a list of categories: Kulturo, Universala Kongreso, UEA, Recenzoj, Opinio, Rete, Historio, Turismo, TEJO, Afriko brilas, Unesko, and Beletra rubriko. The 'Legu' section is also visible, showing 'Kulturo' and 'Universala Kongreso'.



de UEA Emilio Cid, pri la voĉlegado de la revuo (legu pri tio en *Esperanto* 1332(2), p. 40) kaj ni daŭre instigas ĉiujn interesatojn kontribui al tiu ĉi projekto. La *Reta Revuo* strebas buntigi la plurmediecon, publikigante ankaŭ multajn fotojn, kiujn rete eblas publikigi grandkvante kaj altkvalite, kaj ankaŭ videojn kaj sonregistraĵojn, kiujn praktike ne eblas (dume ;)) publikigi en la papera revuo.

Jam nun vi povas trovi en la *Reta Revuo* plurajn ekskluzivaĵojn en diversaj rubrikoj.

Kiel kontribui?

La ĝeneralaj kondiĉoj, rilate la kontribuojn, estas similaj al tiuj por la papera revuo. La teksto de la artikolo ne devas esti antaŭe ie publikigita, oni devas havi konsenton de la aŭtoroj de la fotoj, videoj, sonregistraĵoj kaj la aliaj materialoj por la publikigo. La teksto devas esti aktuala, verkita en bona Esperanto kaj ne devas enhavi falsajn, ofendajn informojn, malpermesitajn laŭleĝe.

Viajn kontribuojn bonvolu sendi al redakcio@revuoesperanto.org kun la noto "[por la Reta Revuo]" en la titolo de la mesaĝo.

Beletra rubriko

En la papera revuo ni ne publikigas beletraĵojn, sed en la *Reta Revuo* por tio ekzistas aparta rubriko. Vi estas bonvenaj sendi por publikigo tie viajn rakontojn, poemojn, teatraĵojn ktp., originale verkitajn en Esperanto. Ankaŭ tradukoj al Esperanto eblas, sed konsideru, ke ne devas esti problemoj

kun la kopirajto, rilate al tiuj ĉi verkoj: estas bezonata klara permeso de la aŭtoro, aŭ indiko de la licenco, kiu permesas libere uzi la verkon, aŭ se la verko jam aŭtomate transiris al la komuna havaĵo (kutime 70 jarojn post la forpaso de la aŭtoro, sed ne ĉiam).

Kio pri la recenzoj?

Ni bonvenigas recenzemulojn verki recenzojn por la libroj, kompaktdiskoj ktp. por la papera kaj ankaŭ por la *Reta Revuo*. Kutime la recenzata titolo devas esti vendata en la Libroservo de UEA (<http://katalogo.uea.org/>). Se UEA havas la recenzekzempleron, ĝi povas senpage sendi ĝin al la recenzinto. Se vi jam havas la bezonatan titolon kaj deziras verki recenzon pri ĝi, ankaŭ tio bonvenas. Por pliaj detaloj bonvolu kontakti la redakcion.

Laŭ nia forta opinio normala recenzo devas ne rerakontante la enhavon (krom etaj pecoj, kiuj povas aparte allogi legantaron) krei imagon pri la libro, por ke ajna leganto povu kompreni, ĉu la libro interesas ĝuste lin, ĉu ĝia literatura kaj lingva nivelo por li taŭgas. Atentu, ke priskribo de gramatikaj aŭ tajperaroj – apartenas jam al tute alia ĝenro; en recenzo tute sufiĉas duvorte diri, ĉu ili enestas kaj ĉu ili vere malfaciligas la legadon. Pli gravas kvazaŭ malfermi al leganto pordon en la libron, akompani la enironton en ĝian mondon, farante tiun mondon pli multtavola, pli profunda kaj ankaŭ pli komprenebla.

Ni memorigas, ke literatura recenzo servas ne nur por helpi al legantoj kompreni, ĉu ili volus aŭ ne volus

tralegi tiun aŭ alian libron, sed ankaŭ helpas al inta kaj onta leganto kompreni tion, kion li mem ne komprenus. Ajna libro havas iom da kaŝita senco. Krom tio ajna libro naskiĝas kadre de iu kulturo – temas kaj pri vasta kulturo – landa, popola, kaj pri kulturo malvasta – societa, komunuma, kiu povas esti ne sufiĉe komprenebla por la vasta legantaro. Tio aparte gravas en Esperantujo, kies bunta kulturo vere originas el kulturoj tiel multnombraj kaj diversspecaj, ke apenaŭ troviĝas homo vere sperta pri ili ĉiuj. Do ankaŭ tiun rolon – helpi al aŭtoro malfermi kaj klarigi erojn de alia kulturo, plenumu bona recenzanto.



La sekvaj tipoj de recenzoj estas bonvenaj:

Tradiciaj recenzoj. Praktike montriĝis, ke optimuma kvanto da vortoj de recenzo por la papera revuo estas de 500 ĝis 900. Plej ofte tio sufiĉas por montri la esencon de la verko.

Mikrorecenzoj. Ni ankaŭ invitas vin kontribui per alia tipo de recenzoj. *Mikrorecenzo* estu ĝis-200-vorta. Tiu ĉi ĝenro estas sufiĉe malfacila. La aŭtoro de tiuspeca recenzo devas kapabli transdoni la bazajn trajtojn de la verko, uzante minimumon da vortoj.

Grandaj recenzoj. Se la recenzo estas tre detala, ampleksas pli ol 900 vortojn, ĝi povas aperi en la *Reta Revuo*.

Tiuj, kiuj deziras recenzi por la revuo *Esperanto*, estas invitataj kontakti la redakcion ĉe redakcio@revuoesperanto.org aŭ pere de la poŝtadreso, indikita en la kolofono. Tiuj, kiuj ricevis varon por recenzo, estas petataj sendi la recenzon aŭ kontakti la redakcion. Varojn ricevatajn kaj nerecenzitajn oni fakturos al la ricevinto.



Rakontu pri viaj pasintaj Esperanto-aranĝoj kaj reklamu la estontajn

La unuaj monatoj montris, ke la *Reta Revuo* kaptas la intereson de la legantoj, inkluzive tiujn, kiuj ne abonas la tradician revuon. La materialoj de la retejo estas konigataj ankaŭ al la vasta publiko en diversaj sociaj retoj.

Tiamaniere tiu ĉi platformo estas tre bona loko por rakonti pri la diversaj Esperantaj aranĝoj – ĉu pasintaj, ĉu estontaj. Se vi estas organizanto aŭ partoprenanto de iu el ili, vi povas profiti la okazon sendi raporton kun fotoj por informi Esperantujon pri ĝi. Se la artikolo konformas al la kondiĉoj, ĝi estos redaktita kaj publikigita senpage. Se vi deziras reklami vian eston-

tan Esperanto-aranĝon, nun validas la speciala oferto por reklama artikolo – 15 €, pagitaj al la anonca konto de la revuo *Esperanto*.

Tiaspeca reklama artikolo devas konformi al ĉiuj kondiĉoj, kiuj estis menciitaj supre por la ordinara materialoj.

Krom la eventoj eblas reklami ankaŭ librojn kaj aliajn varojn. Por pliaj detaloj kontaktu la redakcion kaj la CO.

Reta Revuo –

<https://revuoesperanto.org>

Vizitu, kontribuu kaj rakontu al viaj amikoj! Ni estas plene malfermaj por viaj komentoj kaj proponoj!

Kaj ne forgesu sekvi la tradician kaj la Retan Revuon en la sociaj retoj:

<https://www.facebook.com/esperantorevuo/>

https://twitter.com/revuo_esperanto



Kalejdoskope

Esperanto-tablo en la kadro de „Kafejo de la Lingvoj” en Weltmuseum (Monda Muzeo), Vieno, Aŭstrio

■ Walter Klag

En 2018, post kelkara renovigado, remalfermiĝis Weltmuseum (Monda Muzeo) en Vieno, Aŭstrio. Ekde tiam, ĉiun duan lundon, de 16:00 ĝis 17:30, okazas tie „Kafejo de la Lingvoj” kun tabloj por la itala, hispana, germana, angla kaj indonezia lingvoj. La loko estas proksima al la enirejo, en la Kolona Halo. La 4-an de februaro 2019 okazis premiero: „Inaŭguriĝis” Esperanto-tablo, kiun vizitis 5 Esperantoparolantoj el Aŭstrio kaj unu el Pakistano. Venis ankaŭ du junaj interesataj sinjorinoj, kiuj ricevis informan materialon.



Sur la foto de Alfred Heiligenbrunner, de maldekstre: Hans-Michael Maitzen, Walter Klag, Leopold Patek, Franziska Dodik, Mian Salam Shany (Pakistano), Alfred Heiligenbrunner.

Por viziti tiun kafejon oni devas nenion pagi. La aranĝojn organizas la asocio „Amikoj de la Monda Muzeo”.

Pliaj informoj: <https://www.weltmuseumwien.at/programm/>

Kanto de Andrea Bocelli en Esperanto



Foto de Aŭtoro: Dovywiarda (Creative Commons Attribution-Share Alike 3.0 Unported)

Andrea Bocelli estas tutmonde konata itala kantisto (blinda). Ni kuraĝis rekte kontakti lin kaj sendis ligon al *Youtube*, kie estas aŭskultebla la esperantigo de lia fama kanzono *Con te partirò* (Kun vi mi forveturos). Lian respondon kaj la kanzonon mem trovu en la *Reta Revuo*: <https://revuoesperanto.org>.

Laŭ la informoj de Michela Lipari



Vaste kaj plurcele paroli pri Kulturo

■ Fernando Maia Jr.

Kadre de la iniciatoj pri Kulturo ene de UEA ĵus estis inaŭgurita en la *Reta Revuo Esperanto* la rubriko *Monda Kulturo*. La esenca celo de la nova rubriko estas aperigi artikolojn prezentantajn elementojn de niaj diversaj kulturoj tra la mondo – muzika, literatura, pentrarta, kina, arkitektura, danca ktp. – kaj kulturajn aspektojn vastasence: popolajn morojn, lingvojn, tradiciojn, historiojn k.a.

Estas pluraj motivoj malantaŭ tiu iniciato. La unua el ili temas pri tio, ke en tiu serio de artikoloj Esperanto estos pli la rimedo ol la rezulto, tiel ke nia komuna lingvo utilu kiel vektoro de la kultura diverseco de nia mondo. Tio rilatigas tiun agadon al la dua kaj deka artikoloj de la Manifesto de Prago kaj ankaŭ plenumas unu el la misioj de nia Asocio, nome plifaciligi la ĉiusecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj.

Tial, por ke ĝi povu vere speguli nian mondan diversecon, tiu nova rubriko estis pripensita por ke ĉiuj sentu sin liberaj kaj invitataj kontribui. Oni devas ĝin rigardi kiel platformon por engaĝi homojn kundividi la scion pri sia propra kulturo aŭ esplori pri aliaj. Tio cetere estas bona okazo por proksimigi al UEA esperantistojn, kiuj ne emas al primovadaj agadoj, sed amas kulturon kaj ankaŭ kolektivajn produktadojn.

Aldona motivaĵo estas tio, ke la rubriko rolu ankaŭ kiel bona okazo por montri la uzon de Esperanto, kaj tial ĝi principe aperos nur en la reta versio de la revuo. Tiu eblo montri la Esperanto-uzadon povas okazi ne nur per tio, ke la artikoloj, estante en la *Reta Revuo*, estos nature alireblaj kaj kundivideblaj por ĉiuj, sed ankaŭ pere de tradukoj de alilingvaj prikulturaj artikoloj en Esperanton. Tio estas ĝuste la kazo de la unua artikolo de la rubriko, “Esplorante la rilaton inter finnoj kaj kafo”. Ĝi aperis post ĝentila permeso de la aŭtorino Pauline Curtet, kaj de la teamo de la retejo *ThisisFinland*, kie unuafoje aperis la artikolo. Curtet, ĵurnalisto i.a. de *Le Monde*, samkiel la redakcio de *ThisisFinland* antaŭe, ne havis kontakton kun la uzo de la internacia lingvo Esperanto kaj tre scivolis pri la rezultoj. Post la aperigo de la traduko en nia *Reta Revuo*, UEA informis ilin, kaj ili kontente bonvenigis la inaŭguron de la rubriko.

Fine, kvankam la rubriko ne parolas pri Esperanto, ĝi ne bezonas ignori temojn sufiĉe aktualajn en Esperantujo. La inaŭgura artikolo mem nerekte tuŝas la 104-an UK en Lahtio, Finnlando. Tio okazis intence por ekzempli, ke *Monda Kulturo* povas iel rilati al aliaj iniciatoj en Esperantujo, kun implica reciproka riĉiĝo kaj ampleksiĝo de ĉiuj koncernataj agadoj.

Do, se vi emas mem verki viajn artikolojn aŭ post permeso traduki el aliaj lingvoj, UEA instigas vin aliĝi al tiu iniciato kaj antaŭdezi- ras bonan laboradon. Gvidlinioj por artikoloj cele al *Monda Kulturo* estas:

1. **Strukture la artikoloj devos rilati al iu specifa kultura branĉo – Muziko, Beletro, Pentrarto, Kino, Kuirarto ktp. – aŭ al iu kultura aspekto – lingvo, moro, historio ktp. – kaj ankaŭ al iu lando, aŭ mondregiono.**

2. **Enhavne oni estas kuraĝigata verki pri lokaj kulturaĵoj, por ke la serio rolu kvazaŭ mozaiko pri nia diverseco, sed bonvenas ankaŭ artikoloj pri komunaj kulturaj aspektoj tra la mondo.**

3. **La artikoloj estu averaĝe 500-1000 vortojn longaj. Kvankam por la *Reta Revuo* ne estas nuntempe grava limigo el ĵurnalisma vidpunkto, homoj ŝatas en la reto legi malpli longajn artikolojn; tamen oni povos ankaŭ interkonsenti kun la redakcio pri akcepto de pli longaj artikoloj, se la temo tion postulas.**

4. **Ĉiuj el la artikoloj havu bildojn/fotojn, sed ne estu problemoj pri la kopirajto – oni devas zorgi klare informi la aŭtoron de la bildo, indiki la fonton kaj la permesilon uzi la bildon, se ĝi ne estas mem propra kreaĵo.**

5. **Fine la proponatajn artikolojn oni sendu al redakcio@revuoesperanto.org kaj al fmaiajr@gmail.com.**

Tiu iniciato kompletigas la strategiojn de UEA labori pri la fako Kulturo laŭ tri kampoj: la Esperanta, la organiza kaj la monda/internacia kulturo kaj tiu atingi ne okazus sen la kunlaboro kaj subteno de la Estraro de UEA kaj la redaktoroj de la *Revuo Esperanto*, Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova. Sed ĝia vera florado okazos per la aliĝo de nia tutmonda Esperanto-komunumo, kiu povos trovi en tiu ideo oportunan okazon montri la buntecon de nia monda kultura manifestiĝo.

Kiel kondukti en finna saŭno

■ Raita Pyhälä

Oni vidas fotojn pri virinoj sidantaj en saŭno, volvitaj en grandaj bantukoj. Tio estas nur reklamoj. Neniu deca homo lasas iun foti en vera saŭno, precipe ne nudulojn. Virinoj kaj viroj banas sin aparte. Familioj povas saŭnumi kune kaj same povas fari grupetoj de geamikoj. Se partoprenas fremdulo, oni povas vesti sin per bankalsono, bikino aŭ io simila, precipe se troviĝas strando proksime kaj oni ankaŭ naĝos dum la saŭnumado. Tio estas somera kutimo; aŭ vintre por homoj, kiuj el la saŭno iras en "base-neton" hakitan en la glacio de lago/maro/rivero.

La finna saŭno-societo deziras interkonsenti pri komuna maniero kondukti en saŭnoj kaj pri tio, kion oni rajtas nomi finna saŭno. Ĉiu privatulo en sia propra saŭno tamen faras siamaniere. Eksterlandanoj povas havi timojn kaj falsajn supozojn pri la saŭ-

numado. La baza kodo por publikaj pagendaj saŭnoj estas proksimume tia:

1. Elektu la enirejon laŭ via sekso, viroj kaj virinoj aparte. Havu kun vi sapon, ŝampuon, eble spongon aŭ broson, bantukon, purajn subvestaĵojn por uzi post la saŭnumado. Duŝu vin antaŭ ol eniri la varmegejon. *



2. Eniru la saŭnon nuda. Havu kun vi tuketon aŭ iun subaĵon sur kiu sidi. **

3. Se uzeblas naĝbaseno kaj vi volas tien iri, surmetu vian bankalsonon.

4. Ne portu vian bankalsonon en la saŭnon. Duŝu vin denove antaŭ ol eniri la varmegejon. ***

Ĝenerale

La saŭno estas ejo kie oni malstreĉiĝas, ĝuas, ripozas, purigas sin pli bone ol en bankuvo aŭ sub duŝo. Kiam vi ŝvitas, via korpo elpuŝas salon kaj malpuraĵojn. En la saŭno oni ofte sidas aŭ kuŝas silentaj, sed inter geamikoj povas okazi gravaj interparoloj. En la malnovaj tempoj saŭnoj estis kvazaŭ sanktaj purigejoj nemalhaveblaj en la rigora klimato. Oni uzis ilin kiel naskejojn kaj kuracejojn, por masaĝado kaj kupado. Nun preskaŭ ĉiu etaĝdomo havas komunan saŭnon por la loĝantoj, sed ili povas havi ankaŭ siajn privatajn saŭnojn. Kamparanoj kaj posedantoj de somerdometoj povas posedi eĉ plurajn diversajn saŭnojn, ekzemple unu en la domo kaj alian proksiman al lago, unu hejtatan per elektro kaj alian per lignofajro en la tradicia finna maniero.

*La varmegejo en la finna lingvo nomiĝas *löylyhuone*. *Löyly* estas la varmega vaporo, kiu leviĝas, kiam oni ĵetas akvon sur hejtigatajn ŝtonojn. Hejtado per elektro aŭ lignofajro, obskura ejo, kun ne multe da lumo. *Huone* = ĉambro. En la varmegejo oni kutime demandas, ĉu la aliaj volas havi pli da *löyly*. La leviĝonta vaporo igos vin senti pli da varmo, povas eĉ sentiĝi brulige laŭ via sidloko. La varmeĝo rondiras de angulo al alia. La temperaturo de la varmega ĉambro estas ĉ. +70 – +80 celsiaj gradoj. Se apud vi sidas iu, kiu uzas faskon de branĉetoj por frapadi kaj masaĝi sin, tio povas sentiĝi malagrabla, ĉar la varmega aero bloviĝas sur vian haŭton.

**Iaj subaĵoj senpage haveblas en la saŭno, sed propra tuketo estas pli plaĉa al la haŭto.

***La banvestoj kaj la akvo de la baseno kunportas malpuraĵojn (bakteriojn) kaj odoron de kloro. Tio estas konsiderata malhigiena en publika saŭno.



La venontjara kongresurbo Lahtio bonvenigas vin ĉiujn!

Cent jarojn post la fino de Neŭtrala Moresneto

■ James Rezende Piton

Antaŭ cent jaroj, kun la fino de la Unua Mondmilito, la regado de malgranda pridisputata terstrio (kaj sendependa de 1816!) estis aljuĝita al Belgio en la Traktato de Versajlo.

Pri la ligoj inter tiu Neŭtrala (aŭ "Neŭtra") Moresneto kaj Esperanto ni aj gazetoj jam ofte raportis. Komence de 1908 oni anoncis, ke la regiono farigĝo Esperanto-ŝtateto sub la nomo "Amikejo". Wilhelm Molly, loka kuracisto, esperantisto kaj framasono, proklamis la plenan sendependiĝon de Moresneto en la monato aŭgusto. Laŭ inspiro de Gustave Roy, same esperantisto kaj framasono, Esperanto estis unu el la oficialaj lingvoj. La mikroskopa (la areo estis 3,6 km²) ŝtateto daŭris nur kelkajn tagojn, ĉar Belgio kaj Prusio volis plu teni siajn rajtojn.

La 28-an de januaro ĉi-jare, la Belga Poŝto surprizis Esperanto-filatelitojn per eldono de oficiala folio kun du poŝtmarkoj (kapablaj afranki iom pezajn leterojn, ĝis-100-gramajn!). Pro tiu alta afrankpovo, la folio vendiĝas de la Belga Poŝto kontraŭ 9,72 EUR. Ĝia eldonkvanto estas 62 225 folioj.

Inter 1830 kaj 1919, renkontiĝis je unu punkto kvar landlimoj – Bel-



gio, Nederlando, Germanio kaj Neŭtrala Moresneto. La limoŝtonoj montriĝas sur unu el la poŝtmarkoj. La alia prezentas mapon de la regiono kun foto de la zinkominejo, la ĉefa ekonomia povo de la landeto.

La surprizo rilatas al tio, ke la nomo de la regiono en la filatelaĵo aperas sur la bloko kvarlingve, do ankaŭ en Esperanto, kiel "Neŭtra Moresneto"!

Trovi Esperanto-vorton sur oficiala filatelaĵo ĉiam estas plaĉa okazo al Esperanto-filatelitoj. Ili kuniĝas ĉirkaŭ Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj (ELF/AREK).

Por informoj: <http://kolektado.esperanto.cc> kaj E. Doerfler – Via del Ghirlandaio, 18/1 – IT-34138 Trieste, Italio

*Mia tempo
estas en viaj manoj. (Psalm 31, 16)*

Mia kara patrino Nora Caragea

✧ 10-an de februaro 1930 Berlin,
Germanio

✠ 13-an de novembro 2018
Frankfurt/Main, Germanio

Ŝi estis fervora por Esperanto dum jardekoj en sia juneco kaj dum jardekoj en sia maljuneco. Ŝi mankos al mi kaj al multaj konatoj en la Esperanto-movado tra la mondo.

Interalie ŝi tradukis plurajn infanlibrojn el la germana al Esperanto (ekzemple de Gudrun Pausewang: *La infanoj en la arboj*).

Kiel sola infano ne havante kontaktojn en Esperantujo, mi tre ŝatus ekscii pri viaj spertoj kun ŝi dum viaj renkontoj aŭ kunlaboroj kaj viaj memoroj pri ŝi. Skribu al: caragea@mailbox.org.

La funebra soleno jam okazis en decembro en Frankfurt. La entombigo de la urno okazis en la arbara parto por entombigoj en Wilgartswiesen www.ruheforstwilgartswiesen.de

Florina Caragea, Germanio



Momenta kresko en la libroservaj vendoj

■ Ionel Oneț

Kiel mi skribis pasintjare (*Esperanto* 3/2018, p. 55), la vendoj de la kongresa libroservo influas la tutjarajn vendojn de la libroservo. La diferenco inter la sumaj vendoj de 2018 (79 253 €) kaj la vendoj de 2017 (69 664 €) estas komparebla kun la diferenco inter la pasintjaraj kongresaj vendoj (25 822 €) kaj tiuj de 2017 (13 811 €).

Post unujara paŭzo, en la pinto de la sumaj vendoj revenas la populara *Poŝamiko*, kiu cedis sian duan lokon pasintjaran al la pasintjara okupanto de la unua loko, *Pasporta Servo* 2017.

La unua listo ĉi-sube montras la tutan vendonombron de la unuopaj titoloj. La dua listo prezentas nur la unu-ekzemplerajn vendojn.

Vendoj entute

Ekz.	Titolo kaj aŭtoro(j)	Prezo (€)
226	<i>Poŝamiko</i> (B. Allée, K. Kováts)	5,10
102	<i>Pasporta Servo</i> 2017 (listo de gastigantoj de TEJO)*	9,00
96	<i>Internacia Kongresa Universitato 2018</i> (Red. A. Wandel)	18,00
76	<i>La danĝera lingvo</i> (U. Lins)*	18,00
60	<i>Beletra Almanako</i> 30 (Div.)	9,90
60	<i>Beletra Almanako</i> 31 (Div.)	9,90
57	<i>Faktoj kaj fantazioj</i> (M. Boulton)*	10,50
57	<i>Gerda malaperis!</i> (C. Piron)	6,90
53	<i>Nia diligenta kolegaro</i> (H. Gorecka, A. Korĵenkov)	30,00
53	<i>Antaŭ unu jarcento</i> (Red. J. Alcalde kaj J. Salguero)	14,70
53	<i>Beletra Almanako</i> 32 (Div.)	9,90
52	<i>Winnie-la-Pu</i> (A.A. Milne)*	12,30
51	<i>Fabeloj pri amo</i> (A. Striganova)	3,00
45	<i>Ekzercaro kaj Paroladoj</i> (L.L. Zamenhof)	7,50
43	<i>Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto</i> (L.L. Zamenhof)*	9,00
43	<i>Avorto pri murdo</i> (J. Modest)	6,00
40	<i>La teorio Nakamura</i> (A. Löwenstein)	12,00
38	<i>Zamenhof en Varsovio</i> (R. Dobrzyński)*	9,90
38	<i>Nova Esperanta krestomatio</i> (Red. W. Auld)*	9,00
35	<i>En la mondon venis nova lingvo</i> (Div.)	39,00
35	<i>Bonvenon!</i> (F. Gobbo, Y. Gamberoni)	9,90
35	<i>La enigma trezoro</i> (J. Modest)	6,60
35	<i>La bona lingvo</i> (C. Piron)	6,00
34	<i>Dancanta kun ŝarkoj</i> (J. Modest)	9,00
34	<i>Zinko</i> (D. Van Reybrouck)	7,50

Vendoj unuopaj

Ekz.	Titolo kaj aŭtoro(j)	Prezo (€)
57	<i>Beletra Almanako</i> 30 (Div.)	9,90
57	<i>Beletra Almanako</i> 31 (Div.)	9,90
47	<i>Beletra Almanako</i> 32 (Div.)	9,90
31	<i>Nia diligenta kolegaro</i> (H. Gorecka, A. Korĵenkov)	30,00
30	<i>Antaŭ unu jarcento</i> (Red. J. Alcalde kaj J. Salguero)	14,70
27	<i>Bonvenon!</i> (F. Gobbo, Y. Gamberoni)	9,90
23	<i>Aliroj al Esperanto</i> (Red. Ch. O. Kiselman)	16,20
23	<i>Zinko</i> (D. Van Reybrouck)	7,50
22	<i>En la mondon venis nova lingvo</i> (Div.)	39,00
18	<i>La strato de Tanja</i> (K. Kniivilä)	12,00
18	<i>Sortoj frakasitaj</i> (M. Bronŝtejn)	6,90
18	<i>Skaraboj, papilioj kaj aliaj insektoj antaŭ objektivo</i> (O. A. Fischer)	6,00
18	<i>La Zamenhofa Esperanto</i> (Div.)	6,00
17	<i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto</i> (Div.)	66,60
17	<i>Pasporta Servo</i> 2017 (listo de gastigantoj de TEJO)*	9,90
15	<i>La danĝera lingvo</i> (U. Lins)*	18,00
15	<i>Marina ĉe la limo</i> (S. Johansson)	17,70
14	<i>Brel en Esperanto</i> (La Kompanoj; KD)	16,80
14	<i>Hebreo el la geto</i> (PVZ, kajero 5)	9,00
12	<i>Murdo en la teatro</i> (R. C. Gates)	14,10
12	<i>Esperantologio / Esperanto Studies</i> 8/2018 (Red. Ch. Kiselman)	9,60
12	<i>Dancanta kun ŝarkoj</i> (J. Modest)	9,00
12	<i>La enigma trezoro</i> (J. Modest)	6,60

* Eldonaĵoj de UEA/TEJO.

Detalajn informojn pri la ĉi-supraj titoloj kaj pri la ceteraj varoj en nia stoko vi trovas ĉe: <http://katalogo.uea.org/>.

50 jaroj de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

■ Christoph Klawe

La 2-an de marto 1969 fondiĝis la plej tradicia, ankoraŭ ege agema rondo de fakuloj ene de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), nome la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (BMEF). La ekde la komenco aktivaj motoroj kaj iniciatoroj de la grupo, Lajos Molnár kaj Julianna Farkas, raportas pri ĝia riĉa historio:

"Nia Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo (BMEF) fondiĝis la 2-an de marto, en la jaro 1969.

En marto 2019 ni festos do la 50-an naskiĝtagon de la Fakgrupo.

Depost nia fondiĝo la ĉefa celo de nia Fakgrupo estis ĉiam la scienca, medicina aplikado de la Internacia Lingvo, ĉar laŭ nia forta konvinkigo la scienco nepre bezonas justan, neŭtralan, komunan lingvon, certigantan veran lingvan egalrajtecon por ĉiuj sciencistoj. La unuajn jarojn de nia agado ni dediĉis al la lingvolernado. Jam en la jaro 1969 aperis niaj unuaj artikoloj en la cirkulero *Medicinistaj Novvaĵoj*, redaktita de d-ro Jozefo Hradil, en la tiama Ĉeĥoslovakio. Depost marto 1969 nia Fakgrupo kunvenis, kaj ankaŭ nun kunvenas – escepte de aŭgusto – ĉiun unuan, labortagan merkredon de ĉiu monato.

En la jaro 1971 ni la unuan fojon organizis Esperanto-lingvokurson por kuracistoj kaj flegistinoj en la Budapeŝta Hospitalo *László* por Infektaj Malsanoj.

Dum nia regula, oktobra kunveno en la jaro 1972 fondiĝis la Hungara Sekcio de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). D-ro Imre Ferenczy fariĝis afergvida prezidanto de la sekcio.

Ekde la jaro 1973 niaj popularsciencaj kaj sciencaj agadoj evoluis paralele. Depost 1974 ni jam regule organizis solenajn, sciencajn prelegseriojn la unuan merkredon de ĉiu mo-



19-a IMEK, 2014.
Grupe sur Citadella

nato marto, memore al la datreveno de la fondiĝo de nia Fakgrupo.

Ni partoprenis en la redaktado de la esperantlingva parto de plurlingva *Sanitar-Ekonomia Vortaro* de la tiama hungara Ministerio pri Sano. Dum ĝia redaktado ni ankoraŭ povis kunlabori kun Profesoro d-ro Kálmán Kalocsay.

Ekde la jaro 1975 ni regule kunlaboris kun Profesoro d-ro Ottó Haszpra en la redaktado de la *Sciencaj Komunikaĵoj*, la bonega scienca aldono de la revuo *Budapeŝta Informilo*. En 1976 aperis nia scienca artikolo „Varicelo de infanoj kuracitaj per kortikosterojdoj kaj imunsubpremantaj medikamentoj” en *Medicina Internacia Revuo*. La artikolo gajnis la belegan, arĝentan me-

mormedalon de la UMEA-Shinoda-Premio.

En la jaro 1977 ni partoprenis la 1-an Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon (IMEK) en Krakovo. Okaze de la 1-a IMEK ni povis interkonatiĝi kun d-ro Włodzimierz Opoka. Li estis la ĉefa motoro de la konferenco.

Ni komencis prezenti Esperanton por la studentoj de la Budapeŝta Medicina Universitato Semmelweis.

En la jaro 1980 ni fondis la Memormedalon Zamenhof de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo. Ĝis nun 28 eminentaj poresperantaj agantoj ricevis tiun ĉi memormedalon, kreitan de s-ro Sándor Józszai, belartisto laboranta en *Hódmezővásárhely*.

Komence de la 1980-aj jaroj s-ino Józsefné Farkas-Tatár gvidis grand-sukcesan Esperanto-lingvokurson por medicinistoj en la hungara Ministerio pri Sano.

Inter la jaroj 1983 kaj 1985 kelkaj membroj de nia Fakgrupo – inter ili d-ro Miklós Fehér, d-ro Balázs Sze-



Artaj donacoj el la arkiivo de la 50-jara Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

móĥ kaj d-ro Lajos Molnár – kolektis la anatomiajn, farmaciajn, medicinajn, veterinariajn, stomatologiajn kaj dentoteknikajn fakesprimojn por la pretiĝanta *Hungara-Esperanta Meza Vortaro*.

Por nia fidela, por-Esperanta agado nia Fakgrupo en 2001, dum la Zagreba Universala Kongreso, kolektive ricevis la memormedalon de la UMEA-Shinoda-Premio.

Pere de Oszkár Princz, László Gados, Thierry Salomon, János Vida kaj d-ro Balázs Wacha ni partoprenis en la redaktado de la periodaĵo *Eŭropa Unio kaj la Lingva Demando*.

Okaze de la aliĝo de Hungario al Eŭropa Unio pere de 17 kunlaborantoj en la jaroj 2003-2004 ni tradukis Esperanten la unuajn du ĉapitrojn de la *Traktato pri estigo de Eŭropa Konstitucio*. D-ro Seán Ó Riain, irlanda eŭropunia diplomato, la prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, donacis 800 ekzemplerojn de la angla-Esperanta versio por la politikistoj de Eŭropa Unio.

S-ro István Mészáros kontinue faris tre valoran laboron kadre de nia Fakgrupo. Li preparis la eldonojn de la hungara-Esperanta kaj angla-Esperanta versioj de la *Konstitucia Traktato* kaj aranĝis ankaŭ la esperantlingvan subtekston de la kompakta disko kun la prelego de d-ro Gyula Kulcsár pri la natura antitumora defenda sistemo. Li redaktis la eminentan, multflankan, plurlingvan retejon <http://www.egalite.hu>.

Konvinkiĝinte ke nuntempe la junaj studentoj de medicino kaj la kuracistoj apenaŭ okupiĝas pri Esperanto, por antaŭenigi la lernejan instruadon de la Internacia Lingvo, en majo 2006 d-ro Lajos Molnár kaj d-rino Julianna Farkas fondis la Internacian Laborgrupon por Antaŭenigi la Lernejan Instruadon de Esperanto (ALIE), kies laboron apogas du retejoj kaj aparta, interreta diskutlisto (*esperanto-en-lernejojn@googlegroups.com*) kun pli ol 200 partoprenantoj el 40 landoj. Ni kunlaboras kun d-rino Katalin Kováts, kiu redaktas la grandiozan, por-instruistan retejon <http://www.edukado.net>.

En la „Strategia laborplano” de nia Laborgrupo ni rekomendas la in-



struadon de Esperanto en la bazlernejoj, kiel unue lernenda, fremda pontolingvo kaj kapablo-evoluiga lernobjekto; en mezlernejoj, skoltaj aŭ pioniraj taĉmentoj, junularaj organizaĵoj, kiel relative facile alproprigebla ilo de la interkultura dialogo; en la universitatoj kaj altlernejoj, kiel „kataliza lingvo” al la alproprigo de la klasika, latina-greka, scienca vortrezoro kaj al kreskigo de pli efika uzado de aliaj lingvoj.



Dum la jaroj de la tutmonda socia-ekonomia krizo ni opiniis tre grava, ke nia agado devas servi – helpe de la internacia pontolingvo Esperanto – la sanon en ĝia pli vasta senco, kiel korpan, animan kaj socian harmonion.

Dum niaj sistemaj monataj kunvenoj, diskutrondoj, spiritaj metiejoj,

regule okazas prelegoj pri san-protektado: muziko-terapio, naturkuracado, ĉiutaga, diverstipa gimnastiko, lingvaj ekskursoj, novaj, infektaj malsanoj, Yumeiho-terapio, mensa trejnado, instruado de Esperanto por triaĝuloj.

Ekde majo de 2010 ni funkciigas la novan diskutliston *medicinistoj-por-esperanto@googlegroups.com* por helpi la agadon de Universala Medicina Esperanto-Asocio.

En aŭgusto 2010 ni aperigis la unuan artikolon en la Esperanta Vikipedio sub la titolo *Borelioza Lyme*. La interesiĝantoj povas ĝin trovi en <http://eo.wikipedia.org>.

Pluraj membroj de nia Fakgrupo aktive partoprenas la redaktadon de la grandsukcesa interreta frazokolektaĵo *TATOEBA*, kie Esperanto en 2012 okupis jam (inter proksimume 200 lingvoj) la duan lokon. Ni aperigis tie multajn frazojn kun medicina enhavo. Vidu la retejon <http://www.tatoeba.org/epo>.

Somere de la jaro 2014 okazis en Budapeŝto la 19-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso, kies ĉeforganizantoj estis s-ino Katalin Fargó, s-ro János Nagy kaj Profesoro d-ro Włodzimierz Opoka, ĝenerala sekretario de UMEA. Kompreneble, ankaŭ la membraro de la Fakgrupo entuziasme helpis la organizantojn."

UMEA ege fieras pri tiom da senlacaj, altnivelaj agantoj por la disvastigo de Esperanto en medicinaj rondoj, kies sukcesoj estas vere ege altestimindaj. Ni elkore gratulas al la grupo kaj deziras ankaŭ post jam 50 meritplenaj jaroj ankoraŭ sukcesan estontecon.

Instituto Zamenhof en Lomeo, Togolando, juvelo inter la ZEO-j

■ Mireille Grosjean

Mireille Grosjean vizitis la Instituton Zamenhof (IZ) la kvinan de januaro 2015. Se iu restadas en Lomeo, tia vizito nepras. Estas fakto, ke tiu konstruaĵo kaj tiu institucio estas vasta kaj impona.

Mireille Grosjean: Kara kolego Gbeglo Koffi, bonvolu rakonti al ni la geneton de tiu projekto, la komencon, la naskiĝon de tiu establo.

Gbeglo Koffi: Mi eklernis Esperanton en 1984 kaj Hans Bakker estis mia instruisto. La kurso okazis perkoresponde kaj Hans tiel fariĝis mia unua korespondanto. Pri multaj temoj ni interrilatadis kaj kun la paso de la tempo mi fariĝis kvazaŭ kunlaboranto de Hans pri la afrika agado. Memorindas, ke Hans tiam estis komisiito de UEA pri la afrika agado.

Ne nur al mi Hans instruadis Esperanton perkoresponde sed ankaŭ al multaj aliaj afrikanoj. Iom poste mi havis la taskon helpi lin en tiu laboro. Do kune kun li mi pensadis pri la disvastigo de Esperanto en multaj anguloj de la kontinento, kie jam estis uzataj la franca, angla, portugala ktp. Iam mi pensis: «Kiel oni sukcesis enradikigi tiujn lingvojn en Afriko, ĉu el tio oni ne povus ion lerni por enradikigi an-

kaŭ Esperanton? Por disvastigi tiujn lingvojn en Afriko, oni kreis lernejojn. Kial ni ne havu ankaŭ Esperanto-lernejojn?»

En 1996 mi proponis al Hans kreon de Esperanto-lernejo en Togolando. Hans tuj akceptis la ideon, sed kie(l) trovi la monon por tio estis la problemo. Pri la temo Hans kaj mi longe rilatadis kaj poste estis tempo de pripensado. Tamen pluiradis nia kunlaborado pri la afrika agado ĝis 1998, kiam mi elektis estrarano de UEA. Partoprenante estrarkunsidojn en Nederlando, mi havadis la okazon vidi persone Hans kaj paroli kun li. Iam en 2000 dum ni diskutis triope (Hans, Nelly Holevitch kaj mi) pri la afrika agado, revenis la ideo pri kreo de Esperanto-lernejo. Mi memoras diron tiaman de Nelly: «Hans, ni faru la lernejon». Nelly tiam menciis la organizon Wilde Ganzen, kiu helpas en tiaj okazoj. Triope ni vizitis la sidejon de la organizo, kies respondeculin bone akceptis nin. Tiel komenciĝis la kontakto kun organizoj. La

grandan laboron pri kontakto kun nederlandaj organizoj faris Hans Bakker kun la helpo de sia edzino Ans. Pri la tuta afero necesas legi parteton de artikolo: «Certe iuj demandas: kiel togolandaj esperantistoj povis atingi ti-





un sukceson (havi Instituton Zamenhof)? De kie ili prenis la monon? La respondon povas doni Hans Bakker, kiu komencis kolekti monon ĉe nederlandaj neesperantistoj por tiu ĉi projekto. Lernejoj, fondaĵoj, entreprenoj kontribuis por “Lernejo en Togolando” eĉ ne sciante, ke temas pri iniciato de esperantistoj. La esperantistaro, kiu kutimas ricevi alvokojn por finance subteni dekojn da fondaĵoj, ĉi-foje ne estis ĝenata pro tiu ĉi kampanjo. Tamen iuj kontribuis memvole – ĉu unuopuloj, ĉu asocioj. Meritas honoran mencion la nederlanda Esperanto-asocio, kiu estis en la jaro 2000 la unua “sponsoro” kaj tiel metis la fundamenton de la kampanjo. Pli nuntempe: honoran mencion meritas la grupo Sunkompanio en Francujo, kiu eĉ fondis francan helpasocion “Une école au Togo”».

Mireille Grosjean: Kaj nun la lernejo staras, funkcias. Kiom da lernantoj frekventas ĝin?

Gbeglo Koffi: Instituto Zamenhof estis konstruita en 2003–2004 kaj en septembro 2004 ĝin frekventis pli ol 200 lernantoj. La nombro de gelernantoj kreskas tra la jaroj kaj nun (novembro 2018) estas 508 gelernantoj.

Mireille Grosjean: Vi kiel fervora esperantisto volis meti Esperanto-kursojn en la programojn. Ĉu vi sukcesis? Kiel evoluas tiu instruado?

Gbeglo Koffi: La instruado de Esperanto estas la bazo de la naskiĝo de Instituto Zamenhof. Tial, jam ĉe la malfermo de la lernejo en septembro 2004, la gvidantaro de IZ klarigis tion al la gepatroj de la gelernantoj, kiuj aprobis la ideon. Tiel okazas la instruado de Esperanto dum normalaj kurshoroj. La gelernantoj lernas la normalan instru-programon de Togolando kaj krome Esperanton.

Tiu ĉi Esperanto-lernado, kiu komenciĝis en septembro 2004 pluiras ĝis nun kaj Esperanto troviĝas inter la lernobjektoj de la notkajeroj de la gelernantoj.

Mireille Grosjean: Vi foje informas la Esperanto-movadon pri la rezultoj de viaj lernantoj. Bonvolu diri al ni iom pli pri la loko de IZ en la pejzaĝo de la togolandaj lernejoj.



Gbeglo Koffi: En junio 2006 IZ unuafoje prezentis kandidatojn al ŝtata ekzameno pri la fino de la studado en la duagrada nivelo (kolegio por 10-15-jaraj gelernantoj). Tiam ĉiuj kandidatoj sukcesis. En la ĉefurbo Lomeo, kie troviĝas IZ, disvastiĝis la informo kaj tiel

oni pli bone aŭdis pri Instituto Zamenhof. Similan rezulton IZ havis en la sekva jaro 2007. Ne nur en la kolegia nivelo estas tia rezulto, sed ankaŭ en la elementa. Lastajare ĉiuj kandidatoj sukcesis en la ŝtata ekzameno pri la fino de la studado en la elementa nivelo. Menciindas, ke en la duagrada nivelo la rezulto estis 90%. Pro tiuj rezultoj IZ estas tre konata, kaj gepatroj ĉiam deziras, ke iliaj gefiloj vizitu la instituton.

Jes, la lernejo funkcias dank’ al atenta prizorgado fare de TIETo (TIETTI-Instituto de Esperanto en Togolando), kies stabo konsistas el Attiogbe-Agbedmadon B. Mensah, Doumegnon Koffi, Sagbadjelou Kokou kaj mi. Regula kontrolado de la laboroj, sindediĉo de la geinstruistoj kaj sincera kunlaborado estas la ŝlosilo.

Vizitantoj estas bonvenaj en IZ, kiu havas ankaŭ gastoĉambrojn. Jen la kontaktadreso:

Institut Zamenhof
11 BP 48 Lomé 11
Lomé, Togo

Retadreso: 139izo2004@gmail.com



El la historio de la Esperanta gazetaro

Esperanto en la Rusia Imperio: la unuaj jaroj kontraŭstare al cenzuro (Surbaze de dosieroj el la Rusia Ŝtata Historia Arĥivo)

■ Nikolay V. Kuznetsov

En la Rusia Imperio antaŭ la revolucio de 1905–1906 ekzistis cenzuro, sen la permeso de kiu oni povis eldoni nek librojn, nek periodaĵojn. Krome, la cenzuro kontrolis ankaŭ teatraĵojn. Tio faris problemojn por libera komunikado inter verkistoj kaj legantoj, aŭtoroj kaj spektantoj.

Ankaŭ la lingva demando ekzistis en Rusio tiam. La arĥivoj de la Ĉefa Departemento de la Ministerio de Enlandaj Aferoj pri presadaferoj [RGIA* F. 776] kaj de la Peterburga Cenzura Komitato [RGIA F. 777] enhavas dosierojn, en kiuj estas petoj pri eldonado kaj oficialaj decidoj de ŝtataj departementoj pri libroj, periodaĵoj kaj teatraĵoj, verkitaj en la pola, estona, latva, litova, jida kaj ankaŭ la aliaj lingvoj – Volapuko, Esperanto kaj Idiom Neutral. La lastaj tri lingvoj estas interesaj, ĉar ili estis artefaritaj kaj estis kreitaj dum la lastaj 40 jaroj de la ekzisto de la Rusia Imperio. Se ekzistantaj dum la longa tempo lingvoj havis fortan pozicion en la lando, kaj la eldonaĵoj en ili publikigis sen grandaj problemoj, artefaritaj lingvoj dum longa tempo ne povis havi siajn periodaĵojn. La lingvo Volapuko, ekzemple, kiel ni povas vidi laŭ tri dosieroj [1, 2, 3], tute ne ekhavis sian publikaĵon en Rusio, sed Idiom Neutral en 1911 [4] ricevis la eblon eldonadi *Progres. Revui international pro omni interesi de Idiom Neutral*.

Kia situacio ekzistis rilate al Esperanto? Do, la lingvo internacia de doktoro Esperanto estis kreita en 1887 en Pollando, Rusia Imperio. Estas evidente, ke la Rusia Imperio devus esti ankaŭ la ŝtato de la unuaj Esperanto-periodaĵoj. Zamenhof mem pensis pri tio, kaj jam en 1888 petis pri cenzura

permeso eldoni en Varsovio la unuan esperantlingvan gazeton *La Internaciulo* [5]. Sed ĉar la lingvo Esperanto estis nova, la cenzura departemento malpermesis al Zamenhof eldonadi la gazeton.

Kial? Unue, por ke la gazeto povu esti cenzurita, en la cenzurejo devus esti oficistoj, kiuj kapablas legi en la lingvo. En 1888 Esperanto ankoraŭ estis ne tre fama internacie, do oni ne bezonis instrui cenzuristojn pri ĝi. Kaj se neniu el la oficistoj povis legi Esperante, neniu povis permesi ion publikigi. Nur la 13-an (t.e. 25-an) de novembro 1892 en Peterburgo aperis la unua cenzuristo, kiu parolis Esperanton kaj povis diri, kiajn el la proponataj verkoj eblas eldoni en la Rusia Imperio [6:8-8ob].

Do, dum la unuaj kvin jaroj de la ekzisto de la lingvo neniu oficisto en la Rusia Imperio povis legi Esperante kaj permesi eldonaĵojn en ĝi. Sed kio okazis poste? Arĥivaj dosieroj diras al ni, ke libroj en Esperanto preskaŭ senprobleme eldoniĝis en la Rusia Imperio jam ekde 1897 [7]. Sed la unuajn periodaĵojn en Esperanto tie ni ne vidis antaŭ la komenco de la 20-a jarcento, kvankam en 1894 kaj en 1898 oni provis eldonadi la revuojn *Esperantisto* en Peterburgo [8] kaj *Lingvo internacia* en Odeso [9]. Pri la lasta eblas diri, ke se Vladimir Vladimiroviĉ Filipoviĉ (la petinto) decidus eldonadi ĝin en Peterburgo, la ĵurnalo ricevus permeson, kion ni povas vidi el la formo de la decido de la oficistoj [9:7ob].

La unua Esperanto-periodaĵo en la Rusia Imperio aperis nur post 17 jaroj de la ekzisto de la lingvo mem. En la mondo esperantistoj havis jam 21 periodaĵojn en 1904, kiam en la devenŝtato de Esperanto oni komencis eldonadi *Esperanto* de Ilja Davidoviĉ Ostrovski, *Kuracisto*, internacian medicinan revu-

on de Aleksandr Isaakoviĉ Asnes kaj *Ruslanda Esperantisto* de Vasiliĵ Konstantinoviĉ Rogaĉov-Antonov, kunlabore kun A. Daĵbrovski, A. I. Asnes kaj I. D. Ostrovski [10; 11; 12].

La apero de kelkaj Esperanto-periodaĵoj dum nur unu jaro montras, ke en 1904 la lingvo kaj la Movado mem estis konataj al la Registaro kaj havis bonan reputacion. La revolucio de 1905, kiam la cenzuro estis malfortigita, ne estis ligita kun ilia apero, do, ni povas konkludi, ke eĉ sen la revolucia senordo la Rusia Esperanto-movado ricevus eblecon de komunikado.

La arĥivo enhavas ankaŭ informon pri ok revuoj, eldonitaj de 1907 ĝis 1916. La dosieroj pri ili enhavas, tamen, nur permesajn decidojn sen alia informo. Ili nomiĝis *Tutmonda kuriero* (1907), *Internaciaj rilatoj* (1908), *Espero* (1908), *Ruslanda Esperantisto* (1909),



Ruslanda Esperantisto.

Oficiala organo de Societo „Espero“

Senpaga eldono por membroj de Peterburga S-to „Espero“

Manuskriptoj, korespondado k. t. p. devas esti adresataj je nomo de „Societo Espero“ en S.-Peterburgo. B. Podiatskaia, 24. ☎ Telefono 256-98.

— Jara membra enporto 3 rub. (8 fr.) —

Eldonanto: S TO „ESPERO“ en Peterburgo. § Redaktoro D-ro A. L. ASNER.

Unua esperanta presejo en Ruslando de D. P. WEJSBRUT.
Peterburgo: Troickij Prospekt, 3. ☎ Telefono 334-61.

Universala ĵurnalo (1910), *Notoj de Esperantisto* (1912), *Patrino lernejo* (1914) kaj *Verda radio* (1916). Do, dum la lastaj 14 jaroj antaŭ la revolucio en la Rusia Imperio aperis, laŭ la arĥivo, 11 Esperanto-periodaĵoj. Tio estis granda sukceso por la Esperanto-movado, ĉar dum la unuaj 17 jaroj de la ekzisto de la lingvo ne aperis eĉ unu periodaĵo kaj estis nur 3 provoj fari tion.

Sed ni povas vidi, ke oficialuloj en la Rusia Imperio ne tre atente laboris pri la problemo de Esperanto-gazetaro kaj la lingvo mem. Ni povas trovi erarojn en la tekstoj, skribitaj en Esperanto de neesperantistoj. En la dosiero, ankaŭ ligita al la *Ruslanda Esperantisto* de Rogačov-Antonov, ni povas vidi la frazon «Russlanda Esperantisto» en la titolo de la dosiero mem [13], kaj *Internaciaj rilatoj* (1908) estis nomita de oficialulo de la cenzura departemento kiel «Internaciaj rilatay» [14] kaj en ĝia dosiero la lingvo mem estis nomita «eksperanto» [14:1, 2]. Tio montras, ke en la departementoj oni vere sciis ne tre multe pri Esperanto kaj ne estis tre atentaj dum la laboro pri ĝia gazetaro. Tio ankaŭ povas esti la kialo de dumlonga ne-aperado de Esperanto-periodaĵoj en Rusio.

Ni vidas, ke en la Rusia Imperio la Esperanto-gazetaro havis multajn problemojn antaŭ 1917. La lando de la plej forta nacia Esperanto-movado tiutempe estis muta dum longaj 17 jaroj pro la cenzuro kaj la laboro de la oficialaj departementoj de la Registaro. Sed esperantistoj de la Rusia Imperio faris ĉion eblan, por ke en la Rusia Imperio aperu laŭleĝa gazetaro, kaj sukcesis eĉ tiam, kiam la cenzuro oficiale


ekzistis en la Rusia Imperio. Post la revolucio de 1905 rusiaj esperantistoj komencis aktivajn agadon kaj eldonadon en la lando, kio povus esti pli sukcesa, se la revolucio de 1917 neniam okazus. Do, esperantistoj en la Rusia Imperio ekpovis sukcese kontraŭstari la cenzuran politikon de la lando, kvankam ili bezonis multajn jarojn por tio.

Fontoj

- 1) RGIA F. 776. Op. 8. D. 796.
- 2) RGIA F. 777. Op. 4 1893. D. 102.
- 3) RGIA F. 777. Op. 5 1894. D. 53.
- 4) RGIA F. 777. Op. 6. D. 297.
- 5) RGIA F. 776. Op. 12 1888. D. 56.
(Vidu la retpaĝon)
- 6) RGIA F. 777. Op. 4 1892. D. 64.
- 7) RGIA F. 777. Op. 5 1897. D. 110.
- 8) RGIA F. 776. Op. 8. D. 56.
- 9) RGIA F. 776. Op. 13 1898. D. 159.
- 10) RGIA F. 776. Op. 8. D. 1832.
- 11) RGIA F. 776. Op. 8. D. 1893.
- 12) RGIA F. 776. Op. 8. D. 1902.
- 13) RGIA F. 777. Op. 5 1904. D. 231.
- 14) RGIA F. 777. Op. 13. D. 379.

Kelkajn tradukitajn dokumentojn trovu en la Reta Revuo: <https://revuo-esperanto.org>

* Rusia Ŝtata Historia Arĥivo (red.)



Vivo de Zamenhof. Edmond Privat.

Klasika biografio de Zamenhof, kun priskribo de liaj filozofiaj, lingvaj kaj movadaj ideoj kaj agadoj.

Rotterdam, UEA, 2007 (6-a eld.). 171 paĝoj, 18 cm. Prezo ĉe UEA: 7,50 €

La danĝera lingvo. Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto. Ulrich Lins.

Nova, plene reviziita historio pri la atakoj kontraŭ la E-movado, precipe sub Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en la cara Ruslando kaj la orienta Azio.

Rotterdam, UEA, 2016. 375+24 paĝoj, 19 cm. Prezo ĉe UEA: 18,00 €



Lernu!, Edukado.net, Duolingo... kaj nun?

■ Robb Kvasnak

Je mia granda surprizo mi malkovris lingvokurson enretan, kiu povus doni impeton al niaj klopodoj instrui Esperanton mondvaste. Ĝiaj ĉefaj retpaĝoj troviĝas ĉe <https://www.halaulelo.org/revitalize-hawaiian-anytime-anywhere>. Krom tio, la instruisto kaj kreinto de tiu plezurlega kurso aldonis Facebook "praktik-paĝojn" ĉe <https://www.facebook.com/groups/halaulelo/>. Ĉar mi celas paroli la havajan, mi abonis la paĝaron kaj aliĝis al la kurso. Mi devis aĉeti tri librojn de la Universitato de Havajo. Mi nun rapide akiras tiun polinezian lingvon preskaŭ kun la sama rapideco de mia lernado de Esperanto.

Sed kiel tiu kurso malsamas al tio, kion ni jam havas? Ĝi estas ĉiam interaga kurso. Vi ne devas peti helpon. Se vi aliĝas al tiu senpaga kurso, la instruisto tuj respondas al vi persone. Kvankam la havaja lingvo estas ege malpli utila fore de Havajo, kelkcent lernantoj jam aliĝis. La instruisto celas instrui al grupo de tiuj aliĝintoj ankaŭ esti instruistoj aŭ helpinstruistoj. Li krome celas formi interretan grupon de aktivaj interesatoj en komunumo.

Tiu lasta punkto ege gravas. Dum la esploroj por mia doktoriĝa verkaĵo,

mi malkovris ke lingvo-lernantoj lernas tiom unu de la alia, kiom ili lernas de la instruisto. Krom tio, aneco en grupo ligas ilin kaj ili malpli ofte rezignas kaj forlasas la kurson. Ĉiu en la grupo vidas la eksigon de iu alia membro kiel malmotivaĵon al si mem. La membroj inter si donas kuraĝon unu al la alia daŭrigi la lernadon.



Kiam mi komencis la kurson ĉe Hālau 'Ōlelo (Lingvo-Lernejo" en la havaja) mi ekskribis taglibron por registri mian progreson. Ĉar mi estas komencanto, por esti preciza, mi klopodas uzi la bazajn frazojn, kiujn mi lernis en la unuaj ĉapitroj kun vortoj pri miaj spertoj. Tiel mi alproprigas tiujn frazmodelojn kaj la vortprovizon de la kurso, skribante pri mi mem. Do la modeloj kaj la vortoj fariĝas parto de mi mem, de mia persona havajlingva repertuaro.

Nia movado estas multe pli forta ol la movado por la havaja lingvo, ĉar

nur ĉ. 20% de la havaja loĝantaro estas de havaja origino kaj la reganta lingvo de la insularo estas la usonangla, kvankam ambaŭ lingvoj estas oficialaj lingvoj de la tiea registaro. Sed la havaja kulturo, aparte la hulao, altiras ankaŭ multajn nehavajanojn al si. Kiam ili lernas la kantojn de la hulao, kiuj estas en la havaja lingvo, ili ofte deziras akiri tiun lingvon. Sed en nia verda mondo, ni povas kunlabori kiel instruistoj por pli persone zorgi la lernantojn. Mi ja uzas Duolington por la havaja, sed ĝi estas sistemorientita. Kumu Kainoa (Instruisto Kainoa) donas respondpovon al la lernantoj kaj subtenas interbabiladon. Do kvankam temas pri la reto, li donas homan vizaĝon al la kurso, kiu ne havas ununuran fonton por la lernado, sed uzas multajn sistemojn, ekz. propran retpaĝaron, FB, filmojn de Youtube, librojn ne liajn, sed de la universitato, novaĵojn de aliaj ĵurnaloj kaj revuoj, ktp.

Por niaj retaj civitanoj de la nun kreskantaj generacioj tiu aliro ne estas stranga. La 15-ĝis-30-jaruloj kutimas uzi la diversajn programojn de nia cifereca mondo. Ni bezonas grupon de aktivaj instruistoj laborantaj kune por kopii niamaniere la ideojn de Kumu Kainoa. Mi pretas membriĝi en tiun grupon.

La 50-a Jubilea Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA

La stabo de la Centra Oficejo de UEA invitas vin por la 50-a fojo al la Jubilea Malferma Tago, kiu okazos sabate, la 20-an de aprilo 2019, de la 10-a ĝis la 17-a horo en Roterdamo ĉe Nieuwe Binnenweg 176.

Kiel kutime, en la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj; krome, senpage kafo kaj teo. Aldone al specialaj ofertoj, la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la Libroservo.



Modernigi Esperantajn klubojn: la Pernambuka ekzemplo

■ Wendel Pontes

Konstante ni aŭdas plendojn pri tio, kiel fiaskas la strategioj por allogi junulojn kaj kreskigi la membraron, tiel ke la Esperantaj kluboj kaj asocioj maljuniĝas kaj ŝrumpas. Ili ne plu sukcesas varbi. Bedaŭrinde kune kun la evidenta konstato, ke tio veras, ne estas realaj sugestoj kiel kontraŭstari tiun maloptimisman destinton. Mi volas rakonti al vi, kiel la Pernambuka Esperanto-Asocio spertis renoviĝon post konkretaj agoj. La loka movado ekkreskas, pli aktivaj kaj ekrikoltas fruktojn post longtempa paŭzo kaj stagnado.



Ni klimaksis per sukcesa evento, Pernambuka Esperanto-Simpozio, kiu allogis esperantistojn el diversaj urboj, kun altkvalitaj programoj en du lingvoj (Esperanto kaj la nacia lingvo) antaŭenigitaj ĉefe de junuloj. Por ke vi bone komprenu tion, observu la bildon.

Ĝi montras la saman eventon, sed kiu okazis en du malsamaj jaroj. Kiuj estas la motivoj de tiu reentuziasmiĝo? Ĉi tiu artikolo listigas kelkajn paŝojn, kiuj certe kontribuis al nia renovigo, kaj espereble la leganto trovos ĝin utila por pensi pri strategioj pligrandigi la aktivumadon ĉe si.

Koni la movadanojn

Krom esperantistoj ni ĉefe estas geamikoj. Koni la pensmanierojn de la aktivaj movadanoj helpas bone plani strategiojn. Ĉiu havas sian rolon en la asocio.

“Ĉu oni Esperanton parolas bone aŭ malbone? Ambaŭ por ni samvaloras”

Parto de la membroj estas komencantoj, kaj parto estas veteranoj. Klarigu al la unuaj, ke ili daŭre studu kaj ĝuu la “rondon familian”. Klarigu al la parolantoj, ke ili estu paciencaj kun komencantoj.

Kunigi la generaciojn

Novaj esperantistoj ofte alportas entuziasmon kaj energiplenan forton, dum veteranoj eble perdis la batalemon kaj eĉ elreviĝis. Por kunigi la plej bonan parton de ambaŭ, prudenta dialogo estas necesa. Esplori la veteranan sperton kaj novulan energion estas fundamente.

Kunigi la homojn

Nepre aranĝu Esperantan ĉeestan renkontiĝon, ĉefe kun antaŭpripensita programero. Oferti lunĉon por la partoprenantoj estas bona strategio. Tio helpas por la postprelega momento, kiam ĉiuj amuziĝas kaj ĝuas la etoson. Ju pli da tempo ĉiuj estas kune, des pli facile estas rekunvenigi ilin estontece.

Sociaj retoj

La virtuala medio notinde kreskigis nian amikec-reton. Ĉiam diskonigu la lokan agadon, preferinde en la sama momento, kiam ĝi okazas. Tiel la novaj partoprenantoj havos bonan impreson pri la forto de la movado kaj de la personaj rilatoj en la grupo.

Krei partnerecon kun malproksimaj esperantistoj/kluboj

Fari viziton (kaj eble venigi komencanton kun vi al aliaj kluboj) estas efike. Per tiu diplomacia agado, ni sukcesis trovi interesajn homojn kaj inviti ilin ĉeesti nian asocion. Multaj komencantoj interesiĝas pri niaj prelegoj, kiam ni invitas esperantistojn el aliaj regionoj. Ili havas la ŝancon paroli kun nekonata esperantisto, kaj kon-



troli sian propran scipovon babilante kun la vizitanto.

Fortigi la senton de komunumo ĉirkaŭ la asocio/klubo

Ni ekde longe forte ligas la lokan Esperantan movadon kun la asocio. Niaj vojaĝoj, prelegoj, konversacioj kaj amuzaĵoj ĉiam estas citataj kiel ĝia rekta aŭ nereakta agado. Mallonge: ĝui la asocion estas ĝui Esperanton. La volontuloj sentas sin iom pli proksimaj al ĝi, kaj la komencantoj interesiĝas pri la grupo, kiu antaŭenigas la aferojn. Hodiaŭe, multaj el niaj volontuloj kaj membroj fieras pri ĝi kaj propravole laboras por ĝia progreso.

Perfektigi la parolkapablon

La plej grava kaj kerna ideo. Esperantistoj, kiuj volas bone regi la lingvon, nepre bezonas multe legi kaj praktiki. La plej bona maniero fari tion estas partopreni la movadon. Kiam vi montras propraspete, ke valoras la penon bone scipovi Esperanton, per komentoj de filmoj, vojaĝoj, libroj, vi nekonscie instigas komencantojn sin dediĉi. Fakte, tiu parto multfoje estas konsekvenco de la antaŭaj.

Mi provis resumi kelkajn aferojn, kiuj helpis la kreskigon de nia asocio. Notindas, ke tiuj rezultoj okazis post 15 jaroj da senĉesa laboro tiucele. Ĝi ne estas facila, nek rapida, nek ĉiam harmonia, sed konstanta. Se la adopto de kelkaj el tiuj sugestoj helpas vian grupon, klubon kaj asocion, mi ja estos kontenta!

**Oficiala retpaĝo de
Pernambuka Esperanto-Asocio:
www.esperanto-pe.org**

Verko, kiu plenigas vakuojn

■ Fernando Pita


Welker, Herbert Andreas (Red.) *Teozofio – kolekto de novaj kaj malnovaj tradukaĵoj*. Brasília: Thesaurus, 2018. 232 p.
Prezo ĉe UEA: 21,00 €

Raras momentoj dum kiuj legado de recenzotaj verkoj estas ankaŭ okazo por lernado. Kelkfoje – mi konfesu – recenzocele mi devas legi verkojn kies temoj neniam interesus min; aliffoje – kaj certe ĉiu recenzisto jam travivis tian “punon”, – kiam temas pri verkoj tiom tedaj, ke mi entute ilin legas nur, ĉar estas devo de recenzisto profunde analizi la recenzotaĵon. Tio, tamen, tute ne estas la okazo de la ĉi-foja libro: kvankam mi neniam legis pri Teozofio antaŭe, la kolekto preparita de s-ro Welker estas vera kurso pri tiu stud-kampo.

Herbert A. Welker estas instruisto de la germana ĉe la Universitato de Braziljo, verkisto de unu el la plej konataj (portugallingvaj) libroj pri leksikografio en Brazilo (legenda de ĉiu, kiu serioze pripensas iam verki esperantlingvan vortaron), kaj ankaŭ konatas pro la jutubaj videoj, en kiuj li disvastigas kaj Esperanton kaj Teozofion.

Pri la kolektitaj tekstoj, estas ja tre interese vidi, ke kelkaj el ili estis unuafoje publikigitaj esperantlingve jam en 1902! Kaj estas same ĝojige scii, ke en 1913 estis ĉe ni revuo titolita *Espero Teozofia*. Tiuj datumoj – kaj represo de tiamaj tekstoj – montras, ke estas grava kaj antikva rilato inter Esperanto kaj Teozofio, kiun la kvazaŭarkeologia laboro de Welker rivelas, redonas kaj konservas por ni kaj por la estonteco. Sed la libro ne estas nura kolekto de

tekstoj, eldonitaj antaŭ pli ol jarcento: Welker aldonis al ili aliajn, kiujn li mem esperantigis, ĉar li ilin konsideris nepre necesaj por tiuj, kiuj havas sian unuan kontakton kun Teozofio (precipe *Enkonduko en Teozofion*, verkitan de la grava teozofiisto Charles W. Leadbeater, kaj *Ĉiutagaj Meditadoj – Eltiraĵoj el la Leteroj de la Majstroj de Saĝeco*).



Tiamaniere, la libro organizita de Welker estas ja enkonduka kurso pri tiu scikampo, kiun, iasence, oni povas difini kiel “filozofian aliron al religio”, ĉar nudigante religiojn de ĉio, kio en ili estas ŝminkado kaj parfumado, ĝi logike analizas ilin, kaj tiel iel reduktas religiojn al ilia fundamenta (kaj komuna) kerno: kunligo de homo al Dio.


Kompreneble ĝuste ĉar ĝi postulas vere filozofian aliron, oni dekomen-ce povus kredi, ke temas pri kompleksa, hermetisma aŭ kvazaŭscienca skribaĵo, kies profunda klereco postulas same kleran homon, kaj pri la temoj, kaj pri Esperanto, kiu komprenu ilin.

Tamen nenio povus esti pli malproksime de la vero: kohere al teozofia sinteno, forĵetante ĉion necesan por kompreni Dion, la kompilinto ne nur didaktike organizis la tekstojn, tiel faciligante nian “lernadon”, sed li ankaŭ decidis uzi, en siaj tradukoj, la plej facilajn frazkonstruojn kaj vortoprovizon, kiujn li povus elekti. Tiel eĉ esperantistoj ĵus komencintaj la mez-nivelajn kursojn, povos senprobleme legi, studi, (multe) lerni kaj finfine ĝui la tekstojn de la verko.

Sed ne nur por lernantoj de nia lingvo taŭgas la kompilaĵo de Welker. Pro tio, ke en Esperantujo estas alia serio de tradukoj de teozofiaj tekstoj (ekzemple, tiuj verkitaj de la germanlingva aŭtoro Rudolf Steiner), analizo kaj kontraŭstaro inter ambaŭ “branĉoj” de Teozofio, prezentitaj esperantlingve, estas alia interesa esplorkampo, kiu certe povos devenigi gravajn kontribuojn por la jam intensaj dialogoj inter religio kaj filozofio, en kiuj Esperanto ludas gravan rolon.

Mi devas ankaŭ paroli pri la kovrilo de la libro, kiu, eleganta en sia simpleco, ne brilas pli ol ĝia enhavo, kaj tiel ĝi permesas al legonto fokusigi la atenton al la tekstoj mem. Plia trafa decido de Welker.

Fine, la kolekto organizita de Welker estas libro nepre trastudenda, kiu ne nur plenigu vakuaĵon en nia libro-bretaro, sed ankaŭ en nia ekkono de Dio mem. Kaj ni ĉiuj ja bezonas tiujn vakuaĵojn plenigi.



La arto labori kune

Festlibro por Humphrey Tonkin. Red.
Detlev Blanke kaj Ulrich Lins.
901 paĝoj, 26 cm. Rotterdam, UEA,
2010. Prezo ĉe UEA: 45,00 €

Landa agado

Du gravaj eventoj okazis en Liaoning, Ĉinio

■ Wu Guojiang

Je la 9-a horo sabate, la 5-an de januaro 2019, okazis la 11-a Liaoninga Kongreso de Esperanto en Instituto de Fremdlandaj Lingvoj de Universitato de Shenyang en Ĉinio. Ĝi koincidis kun la fondiĝo de Liaoninga Esplora Bazo de Esperanto. La aranĝojn ĉeestis pli ol 60 esperantistoj el la provinco. Oni elektis profesorinon doktorinon Wang Yan kiel novan prezidantinon de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA). La docento Pan Chengbo, konstanta vic-ĝenerala sekretario, prezidis.



La instituto, kiun prezidas prof. d-rino Wang Yan, fondiĝis en 1980 kaj establis multajn departementojn, inkluzive de fakultato de la angla lingvo, fakultato de la japana lingvo, fakultato de la rusa lingvo, Instituto de Ĉinaj kaj Okcidentaj Kulturo kaj Eduko ktp. Ĝi havas longan kaj amikecan kunlaboron kun multaj universitatoj en Britio, Japanio, Rusio kaj Usono. En la jaro 2006 ĝi enkondukis Esperanton kiel nedevigan studobjekton kaj tiam kreis en la mondo Esperanto-instruan reton, tiel ke pli ol 600 studentoj partoprenis en la kursoj; ĝis nun ankoraŭ aktivas Esperanto-organizo de studentoj, nome Esperanto-societo de Universitato de Shenyang.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!



En la kongreso s-ino Jiao Xiyang voĉlegis gratulajn leterojn, i.a. de la eksprezidanto de UEA Renato Corsetti, s-ino Alessandra Madella el Italio, s-ino Nina Danylyuk el Ukrainio, s-ro Adjevi Adje el Togolando kaj aliaj. S-ro Wu Guojiang faris raporton pri Esperanto en la kvardekjara reformo kaj pordomalfarmo de Ĉinio por Liaoning. S-ro Liu Enwei prezentis biografieton de d-ro Zamenhof, la kreinto de Esperanto. S-ro Liu Zhengkun resumis la laborojn de LEA en la pasintaj jaroj.

Prof. d-rino Wang Yan bonvenigis ĉiujn kaj donis al la estonta laboro de la asocio kvin konsiderojn. La unua estas **konstruado de organizo**. Ĝi emfazas (re)fondon kaj evoluigon de Esperanto-asocioj en urboj krom la interna konstruado de la provinca asocio mem. La dua estas **skala evoluigo**. Ĝi klare intencas altiri amason da instruistoj kaj studentoj al la asocio por multigi la membrojn; espereble ili fariĝos la ĉefa forto por progresigi la asocion. La tria estas **enhavo-etendo**, kiu celas ne nur disvastigon kaj semadon de Esperanto, sed enhavon de aliaj naciaj lingvoj kiel la ĉina, angla, japana, rusa, germana, franca, korea ktp. por diferenco, kunfandiĝo kaj konekzisto de la mondaj lingvoj. Sekvas **disvastigo de Esperanto**, kiu substrekas konstruadon de Esperanto-platfomo per establo de ĝenerala Esperanto-kurso en altlernejoj kaj per funkciigo de Esperanto-kursoj en komunumoj kaj lernejoj, kaj esploron kaj produktadon de mikro-kurso de Esperanto surbaze

de reta video. La lasta rilatas al la **sciencaj esploroj**. La asocio sufiĉe utiligos la du platformojn de Liaoninga Esplora Centro pri Edukado kaj Kulturo de Esperanto en la Orienta Liaoning-Universitato kaj Liaoninga Esplora Bazo de Esperanto en Shenyang-Universitato, kaj profunde studos universitatojn koncernajn al Esperanto kaj kreos multajn ŝancojn de universitataj interŝanĝoj por altigi la nivelon de produktado, eduko kaj esploro.



Poste sep studentoj el la societo prezentis por la kongresanoj la programon de "la lingvoj de la mondo", t.e. ili prezentis la originon kaj evoluon de Esperanto per 7 lingvoj: la ĉina, Esperanto, la angla, japana, rusa, germana kaj franca. La kongreso finiĝis per la himno "La Espero".



Ekzameniĝu

dum la 104-a
Universala Kongreso
en Lahtio

Por pliaj informoj vizitu
[https://edukado.net/
ekzamenoj/ker/uk](https://edukado.net/ekzamenoj/ker/uk)

aŭ skribu al
ker-ekzamenoj@edukado.net



Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: L. Comte.

SOCIETO ZAMENHOF

Aŭstralio: H. Green.

Aŭstrio: S. Stamm.

Belgio: C. Bracke, J. Haazen,

W. Van den Kieboom,

K. Lödör, G. Maertens,

K. Tytgat, F. Witdoeck.

Bosnio-Hercegovino: S. Milojević.

Brazilo: F. Maia Jr.

Britio: J. Murray, G. Sutton,

E. Waterworth, J. Wells.

Danio: T. Bak, E. Hjorth,

K. Jørgensen, S.F. Jørgensen,

E. Kehlet, G.J. Kvist,

E. Mortensen, I. Schrøder,

P. Wraae.

Estonio: V. Hromov.

Finnlando: I. Heikkilä,

H. Laine, S. Mattlin,

S. Mynttinen.

Francio: A. Andrieu,

M. Basso, M. Castaing,

D. Janot, Monique & Maurice

Juy, D. Loisel, C. Longue-Épée.

Germanio: H. Klünder,

F. Selten, A.A.W. Soczówka,

I. Tautorat.

Hispanio: J. Franquesa Solé.

Italio: R. Clerici,

M.T. Malatesta.

Japanio: Fukumoto H.,

Kosomi K., Kikusima K.,

Kuroyanagi Y., Kuzume S.,

G. Pompilio, Saitō T., Sakurai

N., Sawai H., Simizu K.,

Syōzi K. & N.

Kanado: B. Crisp.

Korea Resp.: Kim Y.M., Park S.

Litovio: P. Jegorovas,

V. Žuromskij.

Luksemburgo: B. Moon.

Nederlando: D. Ten Haaf,

A. Bakker-ten Hagen,

P. Coppens, P. Engwirda,

H. Heida, M. Massar-van

Diepen, G. Peet.

Norvegio: K.P. Hoff, I. Rambjør.

Svedio: L. Holmlund, U. Luin,

G. Olsson, S. Svenonius.

Usono: D. Charters, J.

Edwards, C. Lee, H. Tonkin.

PATRONOJ de TEJO

Aŭstralio: B. Lang.

Belgio: W. Van den Kieboom,

G. Maertens, S. Schweder,

F. Witdoeck.

Belorusio: M. Šestestov.

Brazilo: F. Maia Jr.,

L. Marobin, R. Pavinski Barbosa.

Britio: J. & A. Bishop,

M.H. McClelland.

Finnlando: S. Mynttinen.

Francio: G. Darrieux,

D. Janot, Monique & Maurice

Juy, D. Loisel, A. Pialla,

N. Roberts, B. Schumann,

F. Soghomonian, G. Tabard,

R. Triolle.

Germanio: F. Selten.

Hispanio: A. Sarmiento

Domínguez.

Hungario: I. Keményfi.

Italio: U. Pensabene,

M.R. Spanó.

Japanio: Hosomi K.

Nederlando: D. ten Haaf,

M. Massar-van Diepen.

Pollando: R. Williams.

Svedio: O. Pettersson.

DONACOJ

Ĝis la 5-a de februaro

Konto Afriko

Britio: G. Sutton 184,00.

Hispanio: V. Manzano

Arrondo 13,00.

Nederlando: F.D. van Zoest

25,00.

Sumo ĉi-jara: 222,00.

Fondaĵo Azio

Japanio: Aida Y. 32,30;

Aikawa S., Honda T., Kaba

T., Kuzume S., Sasaki R.,

Shimazu J., Yazaki Y. - po

16,15; Hirotaka M., Nakamiti

T., Nisinaga A., Yamaguchi

H., Yosikawa S. - po 21,00;

Shimazaki Y., Ueno Y. - po

24,24.

Sumo ĉi-jara: 298,83.

Fondaĵo Canuto

Belgio: G. Pirlot 50,00.

Britio: G. Sutton 600,00.

Luksemburgo: I. Ertl 40,00.

Nederlando: R. Moerbeek

50,00; A.S. de Vries 10,00;

F.D. van Zoest 25,00

Sumo ĉi-jara: 775,00.

Oficeja ilaro

Grekio: G. Papoulias 12,00.

Sumo ĉi-jara: 12,00.

UNESKO kaj UN

Rumanio: J. Nagy 7,00.

Sumo ĉi-jara: 7,00.

Ĝenerala kaso

Brazilo: F. Maia Jr. 29,56.

Britio: A. Page 50,94;

G. Sutton 100,00.

Francio: M. Basso 52,00.

Germanio: C. Hamelbeck

150,00; M. Lins 30,00.

Nederlando: R. Moerbeek 50,00.

Svedio: K. Fossevall 270,95.

memore al Heide Schäffer:

Luksemburgo: C. Nourmont

100,00.

Sumo ĉi-jara: 833,45.

Puto de serpentoj

■ Stefan MacGill

Serpentoj en la puto. István Nemere. 184 p. Sezonoj, Kaliningrad, 2009. Prezo ĉe UEA: € 18,00

Jen politika kaj socia romano pri enmigrintoj, terorismo kaj la konfliktoj inter kulturoj kaj la grandaj religioj, unuavice inter la islamo kaj kristanismo. Efektive, temo tre aktuala en la nuntempa vivo en la lando de la aŭtoro kaj tra la tuta Eŭropo. Sed la verko datiĝas el 2009 kaj estis certe verkita pli frue ol tio – la plej lastatempa realmonde aludita atenco estis tiu en Londono en 2005. Do, longe antaŭ la amasaj alvenoj de migrantoj en 2015.

La romano zorgas loki sin en lando, kiu ne estas identigebla kun certeco. Multo okazas en 'La Urbo' – ĉiam kun majuskloj – la sola limiga faktoro estas, ke en tiu ĉefurbo loĝas iom signifa komunumo de araboj kaj islamanoj, kune kun siaj moskeoj, tapiŝvendejoj kaj universitataj grupoj. Kiel kutime

de la aŭtoro, la lingvaĵo estas rekta, klara kaj ne tro komplika. Glosoj estis prezentitaj por kvar specifaj etnaj terminoj; krom tio la romano havas malpli ol kvin vortojn, kiuj sendus kapablan leganton al vortaro.

La tuto disvolviĝas en trideko da ĉapitroj, tipe longaj inter 1 kaj 6 paĝojn, do la verko estas facile digestebla. Kiel kutime por la ĝenro, la romano estus facile imagebla en filma versio, kun oftaj saltoj, de unu ĉapitro al alia, inter lokoj kaj roluloj. Do, en unu momento ni trovas nin apud la centro de terorisma ĉelo plananta atakojn, en alia en la sekreta sidejo de la kontraŭ-terorista polica fako, eĉ en dezerto en lando longe for de tiu, kie okazas la ĉefa parto de la intrigo, foje ĉe ŝajne periferiaj rolantoj, kiuj tamen ludas decidan rolon en la kulmina evoluigo de la intrigo.

Malfacilas diveni la sintenon de la aŭtoro al la temo de terorismo; en



la romano aperas komentariaj scenoj, prezentitaj ĉefe en la formato de televidaj raportaĵoj. Pro unua kaj poste dua teroristaj atakoj, abundis ebloj por intervjuoj – kun policistoj, arabistoj kaj similaj fakuloj. La komentarioj de la arabaj vidpunktoj estas malpli eksplícite prezentitaj – interalie legeblas pluraj citetoj el la Korano. La titolo de la romano devenas el fableca rakonto, citita ĝuste el tiu fonto, kadre de intervjuo kun la ĉefino de la kontraŭ-terorisma grupo.

Jen valora plia kontribuo al la populara literaturo en Esperanto.

Esperanta antologio. Poemoj 1887-1981. Red. William Auld.

Pli ol 850 originale verkitaj poemoj de 163 poetoj donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto; kun postparolo de W. Auld kaj 36 paĝoj da biografiaj notoj. 12+888 paĝoj, 22 cm. Rotterdam, UEA, 1984 (2-a eld.). Prezo ĉe UEA: 9,00 €.



Vere majstri lingvojn eblas nur per ĉiutaga babilado



Fariĝu Ora Membro
por havi pli da utilaj funkcioj



Teleportiĝu ien ajn en la mondo



Ligiloj en via profilo iĝas klakeblaj



Ne plu reklamoj



Estu nevidebla en la apuda listo,
dum vi povas vidi ĉiujn

Venontaj renkontiĝoj

Ni listigas nur kelkajn Esperanto-aranĝojn, kiuj estas planataj por la periodo aprilo-julio 2019. Pri ĉiuj informoj de eventoj respondecas nur la organizantoj mem. Plenan kaj aktualan liston de konataj E-aranĝoj vi povas trovi ĉe la Internacia kalendaro: www.eventoj.hu.

Aprilo

15–22: PSI – Printempa Semajno Internacia – en Hochspeyer (Rejnlando-Palatinato), Germanio. La familia renkontiĝo okazos en la naturparka junulargastejo Hochspeyer, Rejnlando-Palatinato, Germanio. Dum la semajno ni havos prelegojn, Esperanto-kursojn, sportajn okupiĝojn, diversajn manlaborojn, ekskursojn kaj koncertojn. Organizas: Germana Esperanto-Asocio, Katzbachstrasse 25, DE-10965 Berlin, Germanio. ✉ <https://psi.esperanto.de/2019>



19–20: BEL-Konferenco – en Pouso Alegre, Brazilo. Tradicia konferenco de Brazila Esperanto-Ligo. Diversemaj prelegoj kun posta diskutado. Senpaga aranĝo. Kunvenejo: Centro Cultural Cleonice Bonillo Fernandes: Praça Senador José Bento, 2; Centro; Pouso Alegre – MG. Organizas: Brazila Esperanto-Ligo kaj Esperanta Ambasadego, Rua Quatro, 156; Colina Verde; Pouso Alegre – MG; BR-37550-000, Brazilo. ✉ esperanton@gmail.com

Majo

1–5: 78-a Hispana Kongreso de Esperanto – en Málaga, Hispanio. La kongreso okazos komence de majo en Málaga tiel, ke vizitantoj havos la ŝancon ĉeesti samtempe tri altirajn eventojn kun ilia propra etoso: Hispana, Andaluza kaj IFEF-kongresoj. Ili estos parte sendependaj kaj parte koincidaj, kaj do oni povas partopreni en iliajn agadojn depende de siaj tempdisponoj



kaj ŝato. Ni invitas vin partopreni tiun ĉi feston de la esperantista kulturo. Kontaktu la organizantojn ankaŭ se vi deziras kunlabori en la organizado kaj proponi iun programon. Organizas: Hispana Esperanto-Federacio (HEF), Andaluza Esperanto-Unuiĝo (AEU), strato Anfora, 6-5ºD, ES-29013-Málaga, Hispanio. ✉ kongreso@esperanto.es

17–20: 114-a Skota Kongreso de Esperanto – Ĝi okazos en la hotelo Robertson Arms, en la urbo Carnwath, Lanark, Skotlando. Estos prelegoj, manĝoj kaj festado en intima atmosfero en la hotelo, kaj ankaŭ 2 ekskursoj. Organiza adreso: E-Asocio de Skotlando, David Bisset. ✉ dwbisset@gmail.com

Junio

7–10: 96-a Germana Esperanto-Kongreso – en Neumünster, Germanio. Organizas: Deutscher Esperanto-Bund e.V., s-ino Sibylle Bauer, Katzbachstr. 25, DE-10965 Berlin. ✉ sibylle.bauer@esperanto.de

29–8: NASK-2019 – en Raleigh, NC, Usono. Organizas: Esperanto-USA, s-ino Ellen Eddy. ✉ eddyjellen@aol.com

Julio

6–14: 55-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, BET – en Panevėžys, Litovio. La partoprenantoj povos ĝui ĉiutagan artan

programon de litoviaj kaj alilandaj artistoj, inter kiuj estos Kaŝi kaj la rusia muzika grupo Ekvinokso. Organizas: Litova Esperanto-Asocio.

✉ litova.ea@mail.lt

13–20: 52-a ILEI-Kongreso – en Ĉačak, Serbio. Kongresa temo: Lernado en virtualaj komunumoj. El la programo: Interkona frandvespero, instruista trejnado, E-kursoj por komencantoj kaj komencintoj, prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj, lingva festivalo, simpozio pri la konferenca temo, konferenca bankedo, distraj vesperoj, literatura kafejo, pedagogia foiro, ekskursoj. Organizas: Esperanto kaj Edukado ILEI.

✉ mirejo.mireille@gmail.com

20–27: La 104-a Universala Kongreso de Esperanto – en Lahtio, Finnlando. Organizas: Universala Esperanto-Asocio. ✉ <https://uea.org/kongresoj>



28–4 (aŭgusto): 75-a Internacia Junulara Kongreso, IJK – en Liptov-



ský Hrádok, Slovakio. Ĉeftemo de la kongreso: Kontraŭ antaŭjuĝoj. Organizas: Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, TEJO.

✉ <https://ijk2019.tejo.org>

Memore al Ebbe Vilborg

■ Fernando Maia Jr.
kunlabore kun Siv Burell
kaj Ralf Jalming

La 30-an de decembro forpasis en Gotenburgo la sveda esperantisto Ebbe Vilborg, preskaŭ 93-jaraĝa. Ebbe Vilborg naskiĝis la 14-an de februaro 1926 kaj lernis Esperanton en 1940, tiam 14-jaraĝa knabo. Lia patro ekhavis Esperantan lernolibron, sed, sen tempo por lerni la lingvon, donis ĝin al sia filo. La juna Ebbe baldaŭ rimarkis, ke Esperanto helpadas lin plibonigi sian studadon pri la germana. Ne surprize li fariĝis filologo pri klasikaj lingvoj, doktoriĝinta en 1955 pri la «Konstituo de nova tekstversio de la helena romanverkisto Akilo Tacio», kaj en 1956 fariĝis docento pri la greka en la Universitato de Gotenburgo kaj specialisto pri la micena dialekto de la helena lingvo, verkinta *A Tentative Grammar of Mycenaean Greek*.

Ebbe Vilborg laboris ankaŭ kiel leksikografo, terminologo kaj interlingvisto. Li unue aŭtoris la poŝvortaron *Lilla Esperanto-ordboken* («Malgranda Esperanto-Vortaro») en 1958 kaj fine, en 1992, la grandan vortaron *Ordbok Svensk-Esperanto*, kun 50 000 kapvortoj,

kiu estas nuntempe rete serĉebla kaj estas vera orminejo por svedoj. Membro de la Akademio de Esperanto de 1962 ĝis 1971, en 1965 kune kun Vilho Setälä kaj Carl Stöp-Bowitz li verkis *Esperanto – moderna lingvo kaj sola en 1973 La partecipa problemoj en la Akademio*. De 1967 ĝis 1976 li eldonis la interlingvistikan esperantologian cirkuleron *Fokuso*, kaj lia kvin-voluma *Etimologia Vortaro de Esperanto* (1989, 1991, 1992, 1995 kaj 2001) – pro kiu li ricevis la OSIEK-premion en 1992 – fariĝis fundamenta verko en la kampo de la Esperanta etimologio. Li ankaŭ verkis plurajn librojn pri la latina kaj greka, inter ili la *Sveda-Latina vortaro kaj Latinaj citaĵoj*, kaj en 2006 li ricevis premion de la Sveda Akademio pro sia Esperanto-vortaro.

Ebbe Vilborg estis membro de UEA ekde 1945 kaj delegito dum duona jarcento. En 2001 li estis elektita kiel Honora Membro. Krom tio, en 1947, 7 jarojn post sia esperantistiĝo, li lernis volapukon kaj fariĝis ano de la volapuk-asocio "Dilāda valemik feda Volapükaklubas" (Sekcio de Universala Ligo de Volapukkluboj). En 1961 li diplomiĝis kiel *dalebūd*, laŭ volapuk-movada tradicio, per la manoj de la "ĉifalo" (ĉefo) Johann Schmidt.



Gravega homo por la Esperanto-movado, Ebbe Vilborg estas kare rememorata pro sia konstanta disvastigo de la Esperanto-literaturo, ĉiam temo de siaj prelegoj dum la decembraj eventoj de la Esperanto-Societo de Gotenburgo, multajn jarojn envice. Post lia morto la Esperanto-biblioteko en Stanum certe ricevis oran randon, ĉar ĝi transprenis, pro donaco de lia filo Nicolas Vilborg, la Esperanto-librojn de Ebbe kaj ankaŭ librojn en aliaj planitaj lingvoj, kiel Volapük, Ido, Mondial kaj Interlingua.

La edzino de Ebbe forpasis antaŭ kelkaj jaroj. Ili havas tri gefilojn, kvar genepojn, kelkajn pranepojn kaj certe multajn amikojn kaj admirantojn. Tre lerta kaj samtempe tre humila, Ebbe malavare subtenis la Esperanto-laborojn en sia urbo. Tia homo mankos tamen ne nur loke, sed ankaŭ en nia tutmonda rondo familia.

Éva Farkas-Tatár
(23.09.1924 – 23.11.2018)



Éva Farkas-Tatár kun premio. Fotis Agnes Raczkevy-Eötvös

Ĉiam en la hungariaj Esperanto-radioelsendoj aŭdeblis la profesinivela deklamo de Éva Farkas-Tatár; en kiuj ŝia pura kaj agrabla voĉo servis kiel modelo por multaj aŭskultantoj, pluraj el kiuj nun ludas elstaran rolon en nia E-movado. Ŝi konatiĝis kun Esperanto en 1962 kaj ekde tiam aktive partoprenis en la movado, trejniĝis kiel Cseh-kursoj dum multaj Universalaj Kongresoj kaj aliaj aranĝoj en

Francio, Finnlando, Bulgario kaj Hungario. Ŝi organizis plurajn kristanajn KELI-kongresojn. Dum multaj jaroj ŝi formis la kolonojn sur kiuj kunvenis budapeŝtaj esperantistoj. En 2015 UEA rekonis ŝiajn meritojn per la asigno de la premio Deguchi (vidu la foton).

Stefan MacGill


Ginette (Geneviève) Martin
(1938 – 2018)

Forpasis Ginette (Geneviève) Martin, eksa instruistino, kiu ege aktivis en la Esperanto-movado sine de la orientfranca Esperanto-Federacio. Ŝi kreis grupon en Gérardmer (1988), kien ŝi invitis plurfoje prelegantojn el diversaj landoj. Ŝi ankaŭ instruis Esperanton en diversaj lernejoj. Ĉiun duan jaron ŝi organizis la "amikan tagon" ie en la Vogeza Montaro. Ĝis

2018 ŝi partoprenis en diversaj kongresoj kaj kunvenoj, enlande kaj eksterlande, laste en Lisbono.

La esperantlingvan literaturon ŝi konigis al siaj samlandanoj per kreo de laborskipoj, kiuj tradukis la rakontaron de Spomenka Štimatec *Kroata Milita Noktlibro* (*Journal de nuit – Témoignage de femme dans la Croatie en guerre*) kaj la romanon de Trevor Steel *Flugi kun kakatuo* (*Comme un vol d'oiseaux sacrés*). Ŝi ankaŭ tradukis francan la jenajn librojn: *Strato Zamenhof* de Roman Dobrzyński, *La Ŝtona Urbo* de Anna Löwenstein, *Kiam mi estis la plej feliĉa en mia vivo* de Julia Sigmund.







Abonu

Language Problems & Language Planning

Tri numeroj jare

Abonprezo: 70,00 € (por individuoj);

263,00 € (por institucioj)



La premiitaj verkoj de la **Belartaj Konkursoj** por la jaroj 2013-2018 haveblas en apartaj volumoj ĉe la libroservo de UEA. Ĉe <http://katalogo.uea.org>, entajpu "belarta rikolto" en la kampo 'serĉata verko /aŭtoro' por ricevi aldonajn informojn pri ĉiu volumo.

Ĉe la libroservo de UEA, sesona rabato por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj de la sama libro, sendotaj samtempe al la sama adreso.